



PENSEO

N-ro 353

mar. / 2021

**Monata Beletra Revueto en Esperanto
Honorita de Premio Grabowski, 1994**

Fondita en 1990; Enretigita en 1997 la 32-a jaro <http://www.elerno.cn/penseo/penlisto.htm>

Wally du Temple (Kanado)



IRIGACIO

(Tankao)

Eŭfrata river'!
Sumero, Babilono
Kulturkojnskribo
Akvumi sekan grundon!
Plugi, semi, kalkuli.

Irigacio!
Salto al civilazi'
Agrikulturas –
Rikoltoj kreskas ĝis la
Mara salo invadas!

Pli da nutraĵoj
Pli da bestoj kaj homoj
Novaj homleĝoj
Kreska komerca lert' sed
Venis latentaj faloj!

La salŝtoneroj
De intaj oceanoj
Kuŝis malice
Dezertigi la kampojn
De sensciuloj.

Irigacio!
Ĉu bona progresilo?
Aŭ dependiga
Kaŝa progreskaptilo
De blindaj homamasoj?

Lutro rolmodelo

Lutro de indiĝena popolo, avataro,
Instruanto de virtoj por vilaĝa idaro,
Pri ecoj inaj kaj viraj por pariĝoj belaj,
La glatajn korpajn atentu, movoj
instrucelaj.

Ĝoje ludas pare lutroj akve, aere, grunde,
Glitas ili gracie kun familio garde.
Prizorgeme, atente, ame lutroj gepatras,
Kvankam age ĉio ŝajne tohuvabohuas.

Lutro estas personigo de multitaskado.
Lutro estas mentoro de movema vartado.
Lutro aventurema, respondeca estulo,
Longa, fleksebla, enketema vivulo.

Lutro korpe kaj spirite diras optimismu,
Komonuman la vivadon pace kunpartumu.
Balancu psikan sangon, instinktas la libido.
Glorigu atingojn aliulajn por la tribo.

Vi faru tiel kaj lerte via vivo lutros,
Neniam via agtagordo malgaje putros.




Rita Mkrtchyan (Armenio)



Kion pensas vi en neĝa tago?
Ĉu pri belaspekto de neĝeroj?
Eble pri la frost' senfina vintra

Aŭ pri la vivo iam senespera.
 Ĉarmas bela bildo de fenestro,
 Kie dancas blankaj “papilioj”,
 Neĝo kovras lacan teron, kaj rondiras
 Sen la cel’, kiel neĝeroj, revoj niaj.

Siranuish Slagmulder (Francio)




*Dediĉe al la junaj soldatoj
 pereinte dum 44-taga Milito...*

Mia okulo salutas vin, la granda Suno,
 Alvenas l’ horo por malfermi kurtenon,
 La sunaj radietoj milde eniras ĉe mi;
 Ŝajne, ke nokt’ finiĝas. Bonvenon al mi.
 Ekde, la volo elvekîĝas sufokinde,
 La mondo fariĝas freneza! Mirinde!
 Miloĵ da sakoj da mensogoj falas,
 Jen, tiam neniuj ajn komprenas.
 Nur rememoroj pri nokta torturo,
 Pri la suferoj de miloj da soldatoj,
 La demono rikanas, li volas venĝi,
 Volas pligrandiĝi kaj fari murdojn.
 Morto siajn brakojn malfermis larĝe,
 Ke li postulas kaj ordonas, ke nepre,
 Enĉeligi la verecon, ĵeti en karceron,
 Murdi patriotismon, vendi patrolandon.
 Tamen, sentebblas, ke la nokta teruro
 Malaperas kun l’alveno de sunradioj,
 La Demono de morto kaj de l’ infero
 Cedas siajn lokojn al bela estonteco!
 Vivu la Libereco kaj Armenio!

26/02/2020

Ivanichka Magharova (Bulgario)



Soleca paŝas
 Ŝi sur malseka sablo,
 kun vento dancas!
 Li! Sola! Tasoĵ.
 Mallum’’ kisas fenestron.
 Falas sensan pluv’’
 Sur muta urbo
 etendas aŭdiaŭajn

vindojn subiro

Siv Burell (Svedio)



Mortigi por vivi ?

Rabobirdoj devas mortigi
 por la idojn manĝigi
 kaj por transvivi

Ĉu validas por ni la samaj leĝoj ?
 Ni ja konsideras nin reĝoj
 super la bestoj

Se vi ne mem mortigi emas
 kial vi do aliajn premas
 fari por vi la buĉadon ?

Nia nigra kato

Rigardas nin la nigra kat’
 kiel gastoj en sia dom’
 tre fiera estas ŝia stat’
 ŝi regas super ĉiu hom’

Bonveniga estas ŝi
 je nia reven’ ĉifoje
 karesema do al ni
 prefere al Sven – tre ĝoje!

Kiam mjaŭsas ŝi ĉe pordo
 obeemaj estas ni
 malfermas ĝin laŭ ordo
 sed baldaŭ al gardo revenos ŝi

Jadranka Miric (Serbio)



Vintra sunsubiro

Oriĝas la vintra tag’
 preta al la lunovag’.
 Dum suno subiras okcidente
 naĝas ruĝa nubaro oriente .
 La ĉiela fajro iĝas pigra

Ŝanĝiĝas la koloroj rapide ,
la ruĝan baldaŭ anstataŭas nigra.
Horizonte nigraj spuroj ŝanĝas aspide!

Vi kaj mi

Nova poemo
pri malnova am'
pri eterna temo,
pri kortuŝa rara am'.
Vi kaj mi
kaj filo nia.
Estas nia tri',
malgranda famili'.
Malbonaj sortoj .
Damnita destin'
Ploroj kaj esperoj nur vortoj
ŝanĝiĝos ĝis la fin'.

Disiĝo post amo

Ĝis hieraŭ mia domo estis plena.
Hodiaŭ mi senhejmiĝis, ĵetita en la vivo
pena.
Okuloj ruĝiĝis, pleniĝis de larmoj.
Jes, venis damnita disiĝa voj'.
Solas mi kun duonplena glaso da galo.
Elsaltis demandoj kaŝitaj profunde en mi
kiel plu vivi sen vi?
Falis paca vivo en kalo.
Timas min mia tage malplena anim',
pro amdoloro kiu ne ĉesis.
Kie vi kaŝis vin, al kies sin'
ĝojas vi? Mi apenaŭ spiras.
Tagoj pasas malrapide.
Grizan ĉielon kovris nubaro.
Se mi vidus vin almenaŭ vidalvide
ne estus mi sola inter amikar'.

Elena Popova (Bulgario)



Dioniz' provis min per ruĝa vino. Mi trinkis.
Ho, bongusta , ŝaŭna vino! Malmulte mi
trinkis.

Kia bela estas la mondo! Kiel feliĉa!...
Ĉu mi ebriis? Nur glason da vino mi drinkis...

* * *

— Karulo, ja alkoholon vi ne drinku!
Per paca kapo ĉiam nur akvon trinku!
—Karulino, la surtera edeno ne estas!
Pro tiu aĉa viv', kiel mi ne drinku?...

Wang Guozhen (1956-2015)



Se nur ni amis unufoje

Se ni ne renkontiĝus,
neniam niaj sentoj pezus senmotive.
Se ni maltrafus la bonŝancon
neniam kvietiĝus ni dumvive.

Nur unu ekrigardo
ciklonon povas levi tra la kor'
pejzaĝon belan komprenigi
sur la sterila tero en angor'

Nur unu ekskursado
magrigo povas koron la gracilan.
Ekvido je rivero la aŭtuna
eltiras larman fluon la facilan

Al morto oni iras ne hasteme,
sed senemocias ne al am-apert'.
Se nur ni amis unufoje,
jen estas senbedaŭra spert'.

Eble

Eble ne ekzistus tia tago:
kiel matenruĝo buntus via onto.
Eble ne ekzistus tia tago:
kiel lustroj lumus via glori-rakonto.
Eble nur ekzistus tia sceno:
Grimpi sen pinton eĉ atingi.
Eble nur ekzistus tia sceno:
Flui ja sen ajnajn ondojn svingi.

Eble ni prezenti povos
al vi nur
koron tralavitan de tempo-torent'
vangojn eroditajn per glaci' kaj vent'.

Mi ne volas rekompencan

Se mi faras donon al vi,
mi ne volas rekompencan.
Se mi pagus
por kovi pet-intencon
kiel sensignifa ja fariĝus mi!

Se vi estus lago,
mi volontus esti digo ĉirkaŭanta vin.
Se vi estus monto
mi volontus estis herboj dekorantaj vin.

Hom' fariĝi granda ne certas
sed, jes
sin nobligi li asertas.

Elĉinigis **Eto (Ĉinio)**

Mimoza Ahmeti



Deliro

Rompita,
Malhela,
Gala,
Mi staras, la lumon ellasas,
Mielo el miaj vejnoj elfluas.
Rompita en plej punkto malfortika,
Pro restinta sola,
Kio al neniu nocas,
Sed min detruas
Pro la doloroj
Kiu dolĉecon elfiltrigas
Je premita sango
En la soleco.

Ho, inĝenia estas ja ĉi tiu stato,
Kiam, kompreninte ke ĉion mi perdis,
Senfinan feliĉon mi sentas,
De la mia estaĵo
Kiun mi posedas, Tiun,
Kiun apenaŭ povas donaci
Iu ajn gloro, krono.

Gloro! Kio estas ĉi tiu vorto?
De kie ĝi atingis min,
Kiel ĝi eliĝis?
Ĉu inventaĵo!
(certe ia fia ambicio, nenatura.)

Turniĝas kaj turniĝas mi, ĉe la naturo alvenas:
Haltas, volas prijuĝi, denove retiriĝas.
Tiom bela kaj samtempe mortebla, homo.
Tiom elkora kaj denove soleca.
Tiom da forto kaj same tiom da dubo...

Ho, senĉese
La inerta vortico dum la foriro rivelas.
Ĉiun absoluton ĝi rilatigis senatendite.
Ĉu nur la beleco, tio, pravas
Pretendi?

Kial vi foriras de mi, realaj kreitaĵoj?
En la forirebla reveno la hodiaŭo
En la hieraŭon transformiĝis,
Tiom rapide kiom mi apenaŭ koncipis
(ĉu estas vivo sen la koncipoj)?
La deziro malsatas por la morgaŭo
Kiu ne plu estas mia.

Kial vi foriras de mi, realaj kreitaĵoj,
Mi pasigas vivon de kozoj ĉiam ne ekzistantaj
Kaj nur min mem posedas en la manoj..
Oh, ne ekzistas feliĉo kiel ĉi tiu,
Sed nek ĉagreno kiel ĉi tiu apenaŭ povas esti.



La tristeco

Nenio okazis al vi, mia tristeco.
Vi estas feliĉa ĉar senkaŭza
Verdigas kaj blovas en mia profundeco.
(La tristeco, la flatado, aknulo, revulo,
malfortulo mia. Trompulo.)
Kaj vi, kial vin kaŝas, kial foriras? Nubo.
Ne, neniu forlasis ĉi tiun spiriton, ĉi tiun
domon
sente spiritigita,
neniam.

Ĉio min forlasis...Sed la sonĝo
Kun la tristeco amoras
Kaj jen, ĉiujn oni min redonas.
La vizaĝoj— je vizaĝo al mi.
La okuloj— je okuloj al mi.
La lipoj— kun lipojj...
Kaj mi ne scias kiel..restas al mi nur kisi.
Mi multe kisas. Tio estas la tuto.
La kozojn mankantajn mi kisas.
Kaj ili tuj aperas
Malkovritaj de la nuboj tristecaj.

La sonĝo ne plu havas malamika la
tristecon,
La malamo- la amon.
Mi kisas la mankojn kaj sen morto fariĝas.
Mi kisas min, tio estas la tuto.
Miajn feblojn
Mi kisas...

Kiam la amo ne estas rimedo

Kiam la amo rimedo ne estas
Strangaj mondoj naskiĝas, stelojn dismetas.
Per sonoj de senmorteco la koloroj vibradas
Kaj ĉiuspeca formo, universa ujo
La amo estas.
Kiam tio rimedo ne estas.

Dio, kie vin kaŝis?

Ĉu vi bedaŭris?

Elalbanigis



Bardhyl Senimi
(Albanio)

El Ĉina Antikva Poezio

Qin Guan (1049-1100)

—laŭ melodio *Feino sur piga ponto*

Koloraj nuboj plektas
la mozaikon kun vario.
Bovpaŝitist' kaj Teksistino*
defore vid-al-vidas kun sopira agonio.
Ho, l' Lakta Vojo estas larĝa dekmil
liojn,
ĉi-nokte ili pasos ja kun emocio
tra' l' pigan ponton por intervidiĝo.
Nur unu rendevu' ilia de magio
pli dolĉas ol sennombraj rekuniĝoj
de l' homa mond' sen nostalgio.

Feliĉa renkontiĝ' teneras kiel akvo,
la dato dolĉa ŝajnas sonĝo efemera.
La piga pont' sterniĝas longe,
ne volas ili per rigard' tenera
okulas la revenan vojon de l' pigponto.
Se nur la am' eternas el la kor' sincera
inter la geamantoj, ne necesas
por ili alkroĉiĝi unu la alian
tagnokte kiel plato fera.

**Bovpaŝtisto kaj Teksistino aludas respektive al steloj
Altairo kaj Vego. Laŭ ĉina antikva mito, ili kiel
geamantoj, estas disigitaj de la Ĉiela Rivero, la Lakta
Vojo, kaj estas permesitaj renkontiĝi nur unu fojon en
ĉiu jaro, en la sepa de la sepa lunkalendaro monato,
kiam pigoj formas ponton por ili per siaj korpoj.*

Pri la sonĝo

—laŭ melodio *Proksimiĝas bona afero*

Printempa pluvo ovras florojn,

la montoj verdas des pli hele.
 Ĉe l' rojo en arbar-densejo
 cent oriojoj ĝoje kantas bele.

Sur la ĉielo blua nuboj
 sin svingas kiel drak' fabela.
 Mi kuŝas sub arbombr' ebria,
 senscia pri nenio subĉiela.

—*laŭ melodio Belulino Yu*

Sur ĉiel' la fea persikarbo
 kultivatas nur per rosa fonto,
 ja malkiel ordinaraj herboj, floroj
 kreskigitaj en la homa mondo.
 Sed nun kiu misplantis
 ĝin en la sovaĝa monto?
 Kvankam tie ĉi disfluas
 rojoj en la pitoreska rondo,
 tamen ja neniuj homoj venas
 spekti ĝin je ĝia desaponto.

Delikata frost' tremigas,
 pluv' vualas jen nebule.
 Ŝajne spiro de l' printempo
 daŭras ja senlime nure.
 Ho ve, ĝi ne povas esti retenita
 longe kaj tuj senos jen senspure.
 Ho, ne gravas por vi mi nun drinku
 ĝis ebrio malklara-okule.
 Mi nur timas: kiam mi vekigōs,
 min ĉargenoj ĝenos jen torture.

—*laŭ melodio Silk-lava rojo*

La etaĝdomon sieĝas ĉirkaŭe
 la primavera malvarma aero.
 Ŝajne malfrua aŭtuno
 fridas denove kun pika severo.
 Sur la ekrano pentraj' de akvfluo
 kaj la nebul' des fariĝas pli pala apero.

Kvazaŭ en sonĝo dancflirtas
 floroj libere, leĝere.
 Fajna pluveto vualas
 kiel ĉagren' atakas kruele.
 Mi pordkurtenon mallevas
 jen por eviti ĝenon de ekstere.

—*laŭ melodio Kvazaŭsonĝe*

Longlonga nokt' silenta
 jen kiel akv' kvieta.
 Al pord' riglita strikte
 alblovas vent' impeta.
 Mi el la sonĝ' vekigōs,
 sub olelampo gvatas muso eta.
 Aŭror' alportas prujnon,
 la liton trafas frid' obseda.
 Maldorme, ve maldorme!
 Ekstere jam ĉevaloj henas,
 ekiras homoj al vojaĝo preta.

Elĉinigis



Vejdo (Ĉinio)



Zhuangzi

ĈAPITRO DUDEK-KVARA Xu Wugui

§24-03

Kiam la Flava Imperiestro iris viziti Taiwei, kiu vivis sur la monto Juzi, Fang Ming kondukis por li la kaleŝon, Chang Yu sidis apud li, Zhang Ruo kaj Xi Peng antaŭiris la ĉevalojn kaj Kun Hun kaj Gu Ji sekvis la kaleŝon. Alvenante en la liberan ebenajon proksime de la urbo Xiangcheng, la sep saĝuloj perdis la vojon kaj trovis neniun por demandi pri la vojo.

Ĝuste tiam ili renkontis knabon, kiu paŝtis ĉevalojn, kaj demandis lin pri la vojo, dirante:

“Ĉu vi scias, kie estas la monto Juzi?”

“Jes, mi scias,” respondis la knabo.

“Ĉu vi scias, kie loĝas Taiwei?” ili ree demandis.

“Jes, mi scias,” respondis la knabo.

“Kia mirinda knabo! Li scias ne nur pri la situo de la monto Juzi, sed ankaŭ pri la loĝejo de Taiwei.” La Flava Imperiestro diris al si mem. Poste li sin adresis al la knabo:

“Ĉu mi povus demandi vin pri la regado de la mondo?”

“La regado de la mondo ne estas pli ol tio, kion mi nun faras ĉi tie,” respondis la knabo. “Kio aparta en ĝi? Kiam mi estis tre juna, mi sola vagadis interne de la ses limoj de la spaco. Tiam mi suferis blindumon kaj iu maljunulo konsilis al mi supreniri en ĉaron de la suno kaj vagadi sur la ebenaĵo proksime de la urbo Xiangcheng. Nun ke mia vidkapablo estas iom pliboniĝinta, mi ree vagadas ekster la ses limoj de la spaco. La regado de la mondo ne estas pli ol tio, kion mi nun faras ĉi tie. Kio aparta en ĝi?”

“Certe la regado de la mondo estas ekster via okupo. Sed mi ankoraŭ volus demandi vin pri ĝi,” diris la Flava Imperiestro.

La knabo faris nenian respondon.

Kiam la Flava Imperiestro ree demandis, la knabo respondis:

“La regado de la mondo ja estas kiel la paŝtado de la ĉevaloj. Ĝi estas ne pli ol forigi el la ĉevaloj ĉion, kio povus malutili al ilia naturo.”

La Flava Imperiestro dufoje riverencis la knabon. Li nomis tiun “la ĉiela instruanto” kaj, retropaŝante, foriris.

§24-04

Tiu, kiu lertas en pensado, malĝojas tiam, kiam li trovas nenian okazon por disvolvi sian pensadon; tiu, kiu, lertas en debato, malĝojas tiam, kiam li trovas nenian okazon por elmontri sian elokventecon; tiu, kiu lertas en serĉado de alies eraroj, malĝojas tiam, kiam trovas nenian okazon por elverŝi sian riproĉemon. Ili ĉiuj estas limigitaj de la eksteraj estaĵoj.

Tiuj, kiuj lertas en trompado de la samtempuloj, servas al la kortego; tiuj, kiuj lertas en regado de la popolo, rigardas ofiĉtenadon kiel honoron; tiuj, kiuj estas forta kaj potenca, fieras pri sia venko super obstakloj kaj malfaciloj; tiuj, kiuj estas kuraĝaj, spitas malfeliĉojn; tiuj, kiuj estas plene armitaj, amas batalojn; tiuj, kiuj vivas ermitan vivon, ŝatas sian renomon; tiuj, kiuj donas atenton al la leĝoj, disvastigas la regadon laŭ la leĝoj; tiuj, kiuj respektas ritojn, zorgas pri sia sinteno; tiuj, kiuj praktikas la humanecon kaj la justecon, donas gravecon al la homaj interrilatoj. La terkulturistoj, kiuj ne prilaboras siajn kampojn, sentas sin maltrankvilaj; la komercistoj, kiuj ne negocas en la bazaro, havas nenian celon en la

vivo. La ordinaraj popolanoj, kiuj estas okupitaj je la laboroj de la mateno ĝis la nokto, estas stimolitaj al pli granda diligenteco; la metiistoj, kiuj manipulas siajn instrumentojn, laboras energioplene.

La avaruloj aŭ aviduloj, kies riĉeco ne estas sufiĉe abunda, estas ĉagrenitaj; la ambiciuloj, kies pozicio ne estas sufiĉe alta, estas ĉiam tristaj; la aventuristoj, kiuj serĉas favoron aŭ potencon, trovas plezurojn en la malordo de la socio. Tiuj homoj profitas de ĉiaj okazoj, kiuj sin prezentas al ili, por atingi sian celon, kaj sekve ili neniel povas vivi en la kvieteco. Tio estas tiel certa, kiel la ŝanĝiĝo de la sezonoj, ke nenio povas ŝanĝi ilin. Dronante en eksteraj estaĵoj, ili senĉese uzas sian korpon kaj animon, kio perdigas al ili sian denaskan naturon, tiel ke ili neniam retrovos ĝin ĝis la fino de sia vivo.

§24-05

Zhuangzi diris al Huizi:

“Se iu arkpafanto hazarde trafis la celon sen fari celadon, ĉu oni povas nomi lin bona arkpafanto kaj tiel konkludas, ke ĉiuj homoj en la mondo povas esti arkpafantoj tiel lertaj, kiel la arkpafisto Yi?”

“Jes, oni povas tiel diri,” respondis Huizi.

Zhuangzi ree demandis:

“Se en tiu ĉi mondo do ekzistas neniu komune akceptita vero kaj ĉiu asertas, ke lia opinio estas la vero, ĉu tiam oni povas konkludi, ke ĉiuj en la mondo estas tiel saĝaj, kiel la reĝo Yao?”

“Jes, oni povas tiel diri,” respondis Huizi.

“Se estas tiel,” diris Zhuangzi, “tiam ekzistas entute kvin skoloj, nome la konfuceismo, la moismo, la skolo de Yang Zhu kaj la skolo de Gongsun Long, plus via skolo. Kiu el tiuj ĉi kvin do estas ĝusta? Aŭ, ĉu vi ĉiuj estas similaj al Lu Ju? Iu el ties disĉiploj diris: ‘Mi jam ellernis la Taŭon de vi. Mi jam povas varmigi *ding*-on en vintro kaj fari glacieron en la somero.’ Lu Ju diris: ‘Tio estas ne pli ol estigi la jangon per jango kaj estigi la jinon per la jino. Tio ne estas la Taŭo, kiun mi instruas. Mi do montru al vi la de mi instruitan Taŭon.’ Dirinte tion li komencis agordi du citrojn, el kiuj unu estis metita de li en la salonon kaj la alia en la internan ĉambron. Kiam li plukis la kordon por unu noto sur la unua citro, kaj la dua citro resonas per la sama noto; li plukis la kordon

por alia noto sur la unua citro, kaj la dua citro resonas ankaŭ per la alia noto. La sama fenomeno okazas ĉe ĉiuj aliaj kordoj.

“Se Lu Ju reagordus unu kordon sur unu citro, tiel ke ĝi ne harmoniu kun la kvin ĉefaj notoj, tiam li plukus tiun kordon kaj la dudek kvin kordoj sur la alia citro ĉiuj vibrus. Ĉu tiu ĉi misharmonieco ne similus al la disputoj de viaj kvin skoloj?”

Huizi diris: “Nun la kvar skoloj estas en disputoj kun mi, sin atakante reciproke kaj subigante unu alian per siaj paroloj, argumentoj kaj eĉ sia aŭtoritateco, kaj tamen neniu el ili sukcesis min refuti. Kiel do niaj disputoj povus esti komparataj kun la misharmonieco de la citroj?”

Zhuangzi diris:

“Jam en la regno Qi iu perdis sian filon, kiu vagis en la regnon Song kaj fariĝis tie gardisto de urbopordego kiel kriplulo, dume li trovis sonorilon kaj tre zorge envolvis ĝin kiel grandvaloraĵon kaj neniam serĉis sian perditan filon ekster sia vilaĝo. Ĉu lia kontraŭracia konduto ne sufiĉe similas la disputojn inter tiuj ĉi skoloj?”

“Iu pasaĝero el la regno Chu kverelis kun la pordogardisto de la domo, kie li gastis. Transpasante riveron nokte, li kverelis eĉ kun boatisto tiam, kiam en la boato troviĝis neniu alia homo. Li jam provokis malamikecon antaŭ ol li forlasis la boaton.”

Elĉinigis



Wang Chongfang

(Ĉinio)

Ĉineske

Yanke (Ĉinio)

Vintro en la sudo

—laŭ ĉinesko Sopir-al-sudo*

En vintro
sur la suda ter’

ne videblas neĝfalo
sed nur lazura ĉiel’
kaj varma sunhel’.

Prosperas
floroj en ĝarden’
kaj herboj en junverdo
sen glaciiga ĉagren’.
kaj neĝfala ĝen’.

Sen frosta
penetranta vent’
homoj ĝoje promenas
sur la blua firmament’
ĝis kora kontent’.

En akvo
la senglacia
homoj naĝas plezure
kun sento sunradia
kaj ĝu-ebria.

En la sud’
sen severa frid’
vivas plantoj tutjare
ĉiam kun miena rid’
en grunda humid’.

Ho, vere
belas la tero
sudlanda en la vintro,
sub l’ serena vetero
kaj suna helo.

Jadranka Miric (Serbio)

Januara ŝerco

—laŭ ĉinesko Sopir-al-sudo*

La varmo
ĉi januara
semajnofinon pasis.
Brilis sun’ varma, rara
de neĝ’ montara.

Sub neĝo
la blanka kapet'
videblas pare, al sun'
pozas. Venis la knabet'
plukis galantet'.

Venteto
dancis kun suno
milde karesante vin.
Dum hararo kiel lun'
brilas al la sun!

Galantoj
vintraj floretoj
estas la heroldoj de
printempo. Kolombetoj
sur la tegmentoj.

Revenis
malvarmeco. Ve.
Sune vintro trompis nin.
Estis frue sed dolĉe.
Sed sufiĉa ne!

Iomete printempas

Ŝanĝiĝa
milda vetero
printempas. Homoj ĝojas
pro varma vintr-aero,
de nia tero!

Ĉielo
ruĝiĝis forte
dum fajra sunsubiro.
Mi tre ĝuis senvorte
ĝis sunomorte!

Abrupte
revenis vintro
blankneĝerete kiuj
moliĝas sur la vitro!
Unu neĝolitra!

Glacia

semajno. Nubar'
jen, kirlanta aeren.
Same kriaĉis birdar'
fluge en rondar'.

**Sopir-al-sudo (ĉine: Yijiangnan): ĉina fiksfirma poemo el kvin versoj de 35,77,5 silaboj laŭ rimarangô xa,xa,a (x=senrima).*

Sero (Ĉinio)

Aŭroro

—laŭ ĉinesko Dekses-Silabo*

Per
radioj ĝi kun esper'
alvenas
jen el la ĉiel'.

Ĝi
frapas fenestron de mi
malpeze
ja sen ajna kri'.

Ĉe
mia lito mole tre
min vekas
al matena te'.

Lum'
taga kovras plankon nun
per helo
de la brila sun'.

Mi
min levas el sonĝebri'
por taga
viviga misi'.

**Dekses-Silabo: ĉina fiksfirma poemo el kvar versoj de 1, 7, 35 silaboj, laŭ rimarangô a,a,xa (x=senrima)*

Ivaniĉka Maĝarova (Bulgario)

LA BUBO

Laŭ la Mondsana organizo la malsataj homoj je la tuta mondo estas Tri miliardoj sepcent milionoj da

homoj.

Ŝi eliris el la aŭto, la lasta moda fabrikmarko de la aŭto-industrio, eleganta, bela, luksa. Ŝi estis vestita per la marko “Versace”, kio estis videbla unuavide. Galante ŝi turnis sin al ĉiuj flankoj por kontroli, ĉu ŝi estis rimarkita. Ho, jes, la paparacoj estis ĉi tie. Fotiloj ekklakis, kameroj ekis. Trankvila kaj memamanta ŝi skuis sian belan kapon. Ŝiaj belegaj blondaj, bonaspektaj hararoj disfalis sur ŝiajn ŝultrojn. Ŝi haltis tuj antaŭ la enirejo de la moda domo “Versace”.

—Sinjorino, —la servisto el la magazeno, klininta ŝultrojn, diligente etendis sian manon — la ŝlosilojn, mi petas!

Kun iom da malrespekto, la damo metis la ŝlosilojn, de la arĝenta “Honda”, en lian manon, aldonante:

—Estu ĝi ĉi tie post tri horoj! Mi ne atendas! — pensante “Ĉu mi sukcesos, dum tiom malmulta tempo, serĉi, provi kaj aĉeti? Montri mian novan vizaĝon al la klaĉulinoj, rakonti pri la nova dieto, per kiu mi jam perdis 300 gramojn sen sekvi severajn dietojn. Eĉ la ĉokolado estas permesita.”

Ŝi ĉirkaŭrigardis ĉiujn flankojn. La paparacoj estis sur siaj lokoj. Kun kontenta rideto sur la vizaĝo, ŝi ekmarŝis al la enirejo de la modmagazeno.

Sed ...

—Ho, Dio mia,— ŝi ekkriis.

Kaj kio okazis en la sekvaj minutoj, ŝi eĉ ne povis kompreni. Malpura bubo blokis ŝian vojon, petante almozon. De kie ĝi venis? Kiel ĝi alproksimiĝis kaj kiu permesis al ĝi?

—Helpon!!! Kio estas ĉi tiu naŭza estaĵo? — ŝi ne finis ankoraŭ sian indignon dum kio la infano estis forpelita. La oficisto trenis la infanon je la kolumo de lia eluzita manteleto, kaj ĵetis lin sur la straton. La knabo timigite rigardis la rapidantajn aŭtojn, kiuj preskaŭ venos super ĝi, preterpasante unu la alian.

—Kial vi venis denove? Mi diris al vi hieraŭ, ke via loko ne estas ĉi tie! Mi avertis vin, ke se vi aperos denove, mi telefonos al la polico, por ke oni forvenigu vin tie, kie estas via loko... For! Kaj miaj okuloj neniam revidu vin tie ĉi! Li eksvingis, kaj lia peza mano frapis la kapon de la knabo.

—Mi nur volis ...— La infano ne sukcesis diri

siajn vortojn, ĉar sekvis novaj batoj sur lia vizaĝo kaj kapo. Sango elfluis el lia nazo, kiun li provis viŝi per la maniko de sia trafrotita manteleto. La knabeto kuntiriĝis pro doloro, kaj liaj profundaj, malĝojaj okuloj pleniĝis je larmoj, kiuj fluis sur liaj ekflamantaj vangoj.

Li venis ĉi tien esperante ricevi almozon, ne por si mem, sed por sia malsana patrino, kiu estis en lito hejme ekde du semajnoj. Domo, se oni povus nomi tiel la barakon, kie li loĝis kun siaj du pli junaj fratinoj. Li nun estis la estro de la familio, post kiam lia patro mortis en fabrika akcidento, kaj li ne ricevis kompenson. Oni ankaŭ forprenis la oficejan loĝejon, kiun ili ne plu rajtis.

—Kaj hodiaŭ mi ne sukcesis! —Li pensis laŭte. —Ĉi tien venas la plej riĉaj... Kial? Li ne metis pecon da pano en la buŝon dum tri tagoj. La malmultaj moneroj, kiujn iu maljunulino donis al li en la merkato, sufiĉis nur por unu pano kaj kelkaj tomatoj.

—Mi ŝtelos! Tio estas peko, sed mi devas nutri mian patrinon...

Kuntiriĝinte pro doloro kaj timo, li apenaŭ povis transiri la trafikatan straton. Aliflanke estis malgranda nutraĵvendejo en la angulo. Li eniros por peti panon kaj iom da kolbaso, kaj li vespere lavos la plankon. Li rakontos ilin pri sia patrino kaj siaj du fratinoj. Pro sia patro forpasinta. Se apenaŭ kortuŝu ilin.

—Kaj se ili ne donos al mi? Mi ekgvatos la vendistinon kaj prenos kion ajn mi povus por manĝado— li pensis, kaj marŝis pli memfide al la pordo de la butiko.

—Kion vi faras ĉi tie denove? — Severa vira voĉo ekkriis la bubon. —Mi forpelis vin hieraŭ, vi estas ĉi tie denove. Nu, foriru!.. — Forta vira mano ĵetis lin al la strato, kie preterflugis luksaj veturiloj, vidataj de elegantaj sinjorinoj kaj negocistoj.

Fratoj Grimm

Tri metiistoj

Estis tri vagantaj metiistoj, kiuj interkonsentis, ke ili kuniros dum la migrado kaj ĉiam laboros en urbo. Sed iam ili ne plu ricevis pagon ĉe sia majstro, tiel, ke

ili fine estis tute trivitaj kaj ne plu povis vivteni sin.

Jen diris unu el ili: “Kion ni entreprenu? Ĉi tie restadi ni ne plu povos, ni migru denove; kaj se ni ne trovos laboron en la urbo, en kiun ni venos, ni interkonsentos tie kun la gastejestro, ke ni skribos al li, kie ni restados, tiel, ke ĉiu el ni povos ricevi sciigon pri la aliaj, kaj poste ni disiĝu.”

Tion ankaŭ la aliaj rigardis la plej bona. Ili formigris, jen ilin renkontis survoje riĉe vestita viro, kiu demandis, kiuj ili estas.

“Ni estas vagantaj metiistoj kaj serĉas laboron. Ĝis nun ni kune migris, sed, se ni ne trovos laboron plu, ni disiĝos.”

“Tio ne rapidas”, diris la viro, “se vi faros tion, kion mi diros al vi, mono kaj laboro ne mankos al vi; ja vi estos grandaj sinjoroj kaj oni veturigos vin en kaleŝoj.”

Unu el ili respondis: “Se tio ne damaĝos al nia animo kaj beateco, ni certe faros tion.”

“Ne”, respondis la viro, “mi ne pretendas ion de vi.”

Sed alia rigardis al liaj piedoj, kaj kiam li ekvidis tie ĉevalhufon kaj homan piedon, li ne volis konsenti al li.

Sed la diablo diris: “Kontentiĝu, mi ne celas vin, sed la animon de alia, kiu jam je duono estas mia, kaj kies mezuro nur ankoraŭ superfluu.”

Ĉar ili do sentis sin sekuraj, ili konsentis kaj la diablo diris, kion li postulos de ili. La unua havis la taskon ĉiun demandon respondi per: “Nia tuta triopo”, la alia “Por mono”, kaj la tria: “Kaj tio estas laŭrajta.”

Tion ili ĉiam diru laŭvice, sed plian vorton ili ne diru, kaj se iu el ili ne atentus la postulon, tuj la tuta mono malaperus. Sed tiom longe, kiom ili obeos la postulon, iliaj poŝoj ĉiam estu plenaj de mono. Tuj dum la komenco li donis al ili tiom da mono, kiom ili povis porti kaj ordonis al ili, ke ili iru en la proksiman urbon kaj en certan gastejon. Ili eniris. La gastej-estro iris renkonte al ili kaj demandis: “Ĉu vi volas manĝi ion?”

La unua repondis: “Nia tuta triopo.”

“Jes”, diris la gastejestro, “tion ankaŭ mi celis diri.”

La dua: “Por mono.”

“Tio kompreniĝas per si mem”, respondis la

gastejestro.

La tria diris: “Kaj tio estas laŭrajta.”

“Ja certe tio estas laŭrajta”, respondis la gastejestro.

Oni nun regalis ilin laŭorde per manĝoj kaj trinkaĵoj kaj plaĉe surtabligis ĉion. Post la manĝo la pagado estis en la vico. Jen la gastejestro etendis la kalkulon al unu el ili. Tiu diris: “Nia tuta triopo”, la dua: “Por mono.” La tria: “Kaj tio estas laŭrajta.”

“Certe tio estas laŭrajta”, respondis la gastejestro. “La tuta triopo pagu, kaj sen mono mi povas doni nenion.”

Sed ili pagis eĉ pli ol li postulis. La gastoj vidis tion kaj diris: “Tiu homoj devas esti frenezaj.”

“Jes, tio ili estas”, diris la gastejestro, “mankas klapo en iliaj kapoj.”

Dum kelke da tempo ili restadis plu en la gastejo kaj diris nenion alian krom: “Nia tuta triopo.” “Por mono.” “Kaj tio estas laŭrajta.”

Sed ili vidis kaj memoris ĉion, kio okazis tie. Granda komercisto enpaŝis kun multe da mono kaj diris: “Sinjoro gastejestro, konservu mian monon, jen la tri frenezaj vagantaj metiistoj, kiuj volas ŝteli ĝin de mi.”

Tion faris la gastejestro. Kiam li portis la vojaĝsakon en la ĉambron, li sentis ke ĝi estas peza de oro. Poste li donis al la tri metiistoj malsupre tranoktejon. Sed la komercisto ricevis supre tute specialan ĉambron. Kiam estis noktomezo kaj la gastejestro pensis, ke ili ĉiuj dormas, li iris kun sia edzino al li kaj ili mortbatis la riĉan komerciston per lignohakilo; post la farita murdo ili denove enlitiĝis por dormi. Kiam mateniĝis, ekestis granda bruo, la komercisto kuŝis morta en la lito kaj estis tute kovrita per sia sango. Jen kunkuris ĉiuj gastoj.

Kaj la gastejestro diris: “Tion faris la tri frenezaj metiistoj.”

La gastoj konsentis kaj diris, ke neniu krom ili faris tion.

La gastejestro sciigis al ili, ke ili venu al li. “Ĉu vi murdis la komerciston?”

“Nia tuta triopo”, diris la unua el ili.

“Por mono”, diris la dua.

“Kaj tio estas laŭrajta”, diris la tria.

“Jen vi do nun aŭdas tion”, diris la gastejestro. “Ili koncedas tion mem.”

Tial oni kondukis ilin en la prizonon kaj havis la intencon mortkondamni ilin. Kiam ili nun spertis, ke la afero estas serioze minaca, ili ja tamen ektimis, sed nokte vizitis ilin la diablo kaj diris: “Eltenu ankoraŭ unu tagon kaj ne fuŝu vian bonŝancon. Al vi oni kurbigos eĉ ne hareton.”

Je la sekva mateno oni kondukis ilin antaŭ la tribunalon, kie la juĝisto demandis: “Ĉu vi estas la murdistoj?”

“Nia tuta triopo.”

“Kial vi mortbatis la komerciston?”

“Por mono.”

“Maliculoj”, diris la juĝisto, “ĉu vi ne timis peki?”

“Kaj tio estas laŭrajta.”

“Ili konfesis la fiagon kaj eĉ estas obstine nepentemaj”, diris la juĝisto. “Tuj konduku ilin al la ekzekutejo!”

Sekve tion oni elkondukis ilin kaj ankaŭ la gastejestro devis paŝi en la cirklon. Kiam la servistoj de la ekzekutisto firmtenis kaj kondukis ilin sur la skafaldon, kie la ekzekutisto staris kun sia elingita glavo, subite estis alveturigata kaleŝo kun kvar enjungitaj sange ruĝaj vulpoj, kiuj estis tiom sovaĝaj, ke fajreroj saltis el la ŝtonoj. El la kaleŝo iu mansvingadis per blanka tuko.

La ekzekutisto diris, ke “graco” survojas. Kaj efektive oni vokis el la veturilo: “Gracon! Gracon!”

Jen la diablo elgrimpis kiel fajna nobla pompe vestita grandsinjoro kaj diris: “Via tuta triopo estas senkulpa; vi nun ekrajtas paroli libere, diru kuraĝe, kion vi vidis kaj aŭskultis.”

Jen diris la plej maljuna el ili: “Ni ne murdis la komerciston, la murdisto staras tie en la cirklo”, kaj ili mansignis al la gastejestro. “La pruvilo trovas sin en la kelo, iru tien, tie li pendumigis ankaŭ multajn aliajn, kiujn li murdis.”

Tial la juĝisto elsendis la ekzekutistajn servistojn. Tiuj trovis ĉion tiel, kiel estis dirite, kaj post kiam ili raportis tion al la juĝisto, li kondukigis la gastejstron sur la skafaldon kaj senkapigis lin.

Tiam diris la diablo al la triopo: “Nun mi havas la animon, kiun mi volis havi. Sed vi estas liberaj kaj

havas sufiĉe da mono por via tuta plia vivo.”

Fonto: Jakobo kaj Vilhelmo Grimm: Infan-kaj domfabeloj,

Eldono lastmana, eldonejo Reclam, “Die drei Handwerksburschen”

tradukis



**Dorothea kaj Hans-Georg
Kaiser (Germanio)**

lingve kontrolis Vladimir Türk

Pri porinfana libro: Letero el la kosmo

Mi atente legis la verkon. Unue, impresis min la ĝusteco kaj flueco de la lingvouzo. Esperanto aperas en ĝi tute natura kaj kolora, sen la komplikaj frazkonstruoj kaj amaso da neologismoj, kiujn oni trovas nuntempe en verkoj de multaj aŭtoroj. Al mi tre plaĉas legi en la pura, simpla Esperanto. Kaj la belaj ilustraĵoj tute kongruas kun la stilo (eĉ povus esti pli da ilustraĵoj!)

Sed pli grava estas la enhavo, mi supozas. La sinsekvo de leteroj pensigis min pri literatura ĝenro, kiun lastatempe oni jam ne ofte trovas: la poezia fantazio. Temas pri la kreo de fantazio, kiu devas kontentigi la homan bezonon de idealismo, belo, spiriteco, etikaj valoroj, altaj moralaj aspiroj. Via reva rakonto iom memorigis min pri *La Eta Princo*. Oni uzas la infanan purecon kiel perilon por ia pli bona mondo. Por mondo, kiu ankoraŭ ne eblas inter ni, ĉar ĝi ne povus kunvivi kun niaj egoismo kaj kruelemo. Aparte plaĉis al mi la ideo pri la memoro, kiun la maro gardas. Samtempe, oni sentas, ke en la priskribo de la vizitoj, oni anoncas, ke la homa spirito devas evolui, do mi rimarkis ian belan mesaĝon de espero, en tiu ideo. En nia nuntempa mondo regata de kruda materiismo, ĝi ŝajnas al mi freŝa karesa blovo.

Se mi rajtus riski frazon, kiun via libro lasis en mi, ĝi estus: Homoj, ni revu pli alten!

recenzis **Paulo S. Viana** (premiito de Belarta Konkurso)



Eldonas Redakcio de *Penseo*

Ĉefredaktoro: s-ro Yida Wei (Vejdo)

Retadreso: vejdo@163.com

www.elperno.cn/penseo/penlisto.htm

